

Migrado en la valo La Brévine

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 567, 1974.08.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintajn semajnojn ni prezentis al vi la urbon La Chaux-de-Fonds kaj ties ĉirkaŭaĵoj, kie stariĝas la sekretario de Kultura Centro Esperantista kaj kie Internacia FERIA Altlernejo okazigos kurssesiojn ekde la venonta somero. La geaŭdintoj povis konstati, ke alloga estas la montaro Ĵuraso por migradceloj dum la liberaj tagoj. Hodiaŭ ni konkludos tiun prelegserion prezentante al vi folkloran kutimon, kiujn ĉiuj partoprenantoj al la kurssesioj de IFA travivos. Samtempe vi ekskursoj kun ni al la valo La Brévine, la svisa Siberio.

A.- Estas tago, kiam la kursoj finiĝas tagmeze. Anstataŭ iri manĝi en restoracio la kursanoj kaj la instruantoj redevuas surmetinte migrad-vestaĵojn. Kaj ekal la valo La Brévine. Duonhora veturado per aŭtomobiloj aŭ aŭtobuso permesas atingi la celon : kvietanta monta lago.

Cl.- La karakterizaĵo de tiu alĵuras valo estas la manko de deflueja rivero. La plej malalta loko formas belan lagon, kies akvo malaperas en truon, kiun en la regiono oni nomas *emposieux*. Tiu ĉi akvo reaperos en alian valon kelkajn kilometojn pri sude sub la formo de tipa vaŭkluzo fonto.

A.- Ĝuste ĉe la bordo de tiu bela montara lago ligna amaso formita de abiaj branĉoj atendas la alvenantojn. Oni ĝin tuj ekbruligas. Dum kelkaj trinkas aperitivan aŭ manĝas frukton, aliaj preferas sin bani malgraŭ la malvarmeco de la akvo. Ni ne forgesu, ke ni troviĝas je pli ol mil metroj de alteco en malvarma valo.

Cl.- La gvidanto klarigas, kio estas la konsekvenco de manko de river-defluejo por la valo La Brévine. Kiel ĉiuj scias la malvarma aero estas pli peza ol la varma. Kutime, simile al la akvo, la malvarma aero fruas sekvante la riverojn. Vi certe jam rimarkis malvarman aerfluron traŭrante gorgon dum kvietanta tago. En la valo La Brévine tiu fizika fenomeno ne povas efektiviĝi. Pro tio dum la kvietaj tagoj la malvarma aero ne povante forflui stagnas en la malaltaj lokoj. Oni tuj rimarkas malaltiĝon de la temperaturo. Eĉ somere ĝi povas atingi la frostnivelon kaj vintre la termometroj atestas pri siberiaj fridoj de minus tridek gradoj centigradaj.

A.- Sed nun la ligno forbrulis. Nur restas varmegaj braĝoj. Spertulo ilin disŝovas. Li formas brulantan neston, kie li ĵetas kolbasojn kaj terpomojn protektatajn de ĉirkaŭvolvita alumina folio. Li tuj rekovras ilin per la braĝoj kaj per aro da novaj branĉoj kaj ĉiuj povas admiri la fajron kaj konstati, ke ne estas siberia temperaturo. Oni sentas, ke la manĝo alproksimiĝas. Ĉiuj sin instalas sur deklivan herbejon pretigante teloron.

Cl.- Dum tiu atendado la gvidanto klarigas, ke antaŭ la ekzisto de la alumina papero oni tiam volvis plurajn gazetfoliojn ĉirkaŭ la kolbasojn kaj ĵetis la terpomojn en la braĝon sen protekto. La kamparanoj eĉ konservas la kutimon unue volvi brasikfoliojn kun eroj de cepo antaŭ ol meti la paperfoliojn aŭ aluminian folion. Tio donas pli da suko al la kolbasoj.

A.- Kun tiuj klarigoj la minutoj rapide forpasas. Alvenis la momento retrovi la kolbasojn kaj la terpomojn. Helpe de longa baŝtono la spertuloj refoje disŝovas la brulantajn branĉojn kaj la braĝojn. Ili ŝvitegas kaj pro tio devas ofte forlasi la laboron por refreŝiĝi. Oni aŭdas la

kolbasojn, kiuj kuiregas. Jen ili. Helpe de la baŝtonoj oni ilin malproksimigas de la fajro. Virinoj ilin rikoltas helpe de forkoj aŭ metalaj teleroj. Ili malpakas ilin. Ĉiuj konstatas, ke temas pri sukaj kolbasoj, kiuj bone akordiĝas kun terpomoj. Agrabla kamparaneca manĝo, kiun oni akompanas de vin-, bier- aŭ pomsuk-trinkado laŭdezire.

Cl.- Sur la fajro, kiu estis reformita, oni havas la eblecon moligi fromaĝpecon. Kaj en granda kaserolo akvo jam ekbolas. Ĝi permesos al ĉiu sensoifiĝi trinkante teon aŭ kafon.

A.- La piknikon sekvas longa siesto en la suno sur la hebejo. Ĉiu havas la tempon admiri la pejzaĝon, kie la verdan koloron nur interrompas la ruĝo de la tegmentoj de la farmdomoj kaj la blanko de ties fasadoj. La observemuloj rimarkas, ke la plej malnovaj domoj konservis ŝindan tegmenton. Ili estas preskaŭ nigraj.

Cl.- Baldaŭ venas la deziro ekmarŝi. Post traveturo de la vilaĝo kaj halto ĉe ties fontano, kie ofte naĝas ezokoj kaptitaj matene en la lago kaj kuirotaj jam vespere en la vivalvida hotelo, oni atingas malnovan farmdomon ĝuste kovritan de ŝindoj. Ĝi estis renovigita profite al starigo de ekspoziciejo. Pentristoj kaj skulptistoj estas invitataj prezenti siajn ĉefverkojn. Ili havas la eblecon feriadu en la tiama koĝejo de la kamparanoj, dum la artaĵoj troviĝas en la tiamaĵ staloj kaj fojnejoj. La ludoj de la trabaro kreas etoson tute apartan. En la centro de la domo ankoraŭ ekzistas kamenejo, kie ŝinkoj kaj kolbasoj estis siatempe fumitaj.

A.- Vastaj torfejoj ankoraŭ kovras la fundon de la valo. Estas la okazo vititi unu el ili kaj konatiĝi kun la kreskaĵoj, kiuj karakterizas la nordajn landojn. La gvidanto montras, kiel la torfon formas musko nomata sfagno. Premante tiun muskon en la manoj oni facile elfluigas multe da akvo. Blankaj floroj, la erioforoj, aspektas kiel neĝeroj moviĝantaj sur la brun-ruĝa pejzaĝo. Kun la maturiĝo de la somero la erikejo akiras tipan ruĝan koloron kaj la mirtelberoj invitas la plukantojn. Sed bedaŭrinde ili ne havas multe da gusto. La torfo estas malriĉa grundo. Betul- kaj pin-arboj alportas la impreson, ke oni promenas en siberia arbaro.

Cl.- Jen ekzemplo de kultura ekskurso, kiu estos en la programo de Internacia FERIA Altlernejo disvolviĝonta en la urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!